

Numero: 318.
Novembro: 2018.

26-a jarkolekto

VESPERTO

Literaturaj folioj



Redaktanto
Apáti Kovács Béla
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400
Telefona: 06/20/497-03-64
Retadreso: apatikb111@gmail.com
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

Ni parolu sincere pri Esperanto

Konfeso

Kompreneble mi ne asertas, ke la zamenhofa lingvo ne estas bona. Laŭ mi ĝi estas la plej logika kaj belsona lingvo. Rapide oni povas ellerni. Tamen neniu pensu, tiun ĉi lingvon oni povas proprigi sen lernado.

Se efektive ĝi estas tiom perfekta kaj utila lingvo, mi deziras ekscii, kial ĝi ankoraŭ ne disvastiĝis sur la terglobo?

Dum internaciaj kongresoj, konferencoj, eĉ en la ĉiutaga vivo oni multnombre uzas kaj parolas la anglan.

Kvankam ni ĉiuj scias, ĝi estas sufiĉe malfacila lingvo. Krome ĝi ne estas sendependa de nacio. Ĝi disvastiĝis multloke perforte. La anglan lingvon makulas sango. En la „nova mondo” la konkerantoj perforte devigis ellerni sian lingvon.

Malgraŭ tio Esperanto ne fariĝis la dua lingvo de la homaro.

Ofte mi sentas, mi iras senĉese ronde kaj dume nenio okazos. Ni fanraronas pri nia amata lingvo, ke ĝi estas la plej bona, plej bela. En iu tago ĝi fariĝos la dua lingvo de la homaro.

Tio ĉi estas bela sonĝo kaj ĝi misgvidas nin.

Se ni efektive volas, ke Esperanto okupu indan lokon inter la lingvoj, tiam ni senŝeligu la rozkoloran lakon kaj al la dubantoj ni montru ĝian veran vizagon.

Esperanto ne povos superi aliajn lingvojn per similaj devizoj: MONDOPACO, ESPERANTO ESTAS LA LATINO DE LA LABORISTOJ, PROLETOJ ĈIUJLANDAJ UNUIĜU k.t.p... k.t.p...

Tiuj ĉi estas nur vortoj. La homoj volas vidi kaj sperti la zamenhofan lingvon en praktiko.

Ekzemple oni povus aĉeti per ĝi bileton por vagonaro, aŭ oni povu mendu tagmanĝon en restoracio.

Estus tre bone, se ĝi estus uzata en internaciaj rilatoj kaj fine nia lingvo plifaciligus la ĉiutagan komunikadon.

Mi ŝatas Esperanton. Mi ne nur ŝatas, eĉ mi amas, amegas ĝin. Mi amas la zamenhofan lingvon, kiel familianon, bonan amikon, kiel la kamparano la majan pluvon kaj varmajn sunradiojn.

Esperanto estas mia sincera amiko. Ĝi malfermis antaŭ mi sekretajn pordojn kaj mi povis eniri gigantan trezorejon, kie ĉie estas oroj kaj diamantoj. Tiuj ĉi trezoroj ĉiuj estas la miaj. Ilia brilo montras al mi vojon al pli bona kaj pli valora vivo.

Mi povas komprenigi min en la tuta mondo. Mi ne estas plu surdmuta, kiu vagadas de lando al lando serĉante homan voĉon.

Mi scias, ne sufiĉas nur ami ĉi lingvon, sed oni devas aĝi, ke ĝi disvastiĝu kaj baldaŭ ĝi iĝu la dua lingvo de la homaro.

Esperanto ne deziras subpremi aliajn lingvojn kaj kulturojn. Ĝi estas nur simpla komunikilo, per kio la homaro povintus komprenigi sin.

Estus tre bone, se ĝi disvastiĝus kaj multaj homoj uzus ĝin dum internaciaj rilatoj.

Do, estu la tasko de ĉiuj geesperantistoj disvastigi ĉi tiun lingvon, ke ankaŭ la dubantoj vidu kaj spertu, Esperanto estas utila kaj valora lingvo.

Miaj vortoj ne estu nur forflugantaj pensoj, kiuj malaperas en la nenio!

Ni klopodu konvinki niajn parencojn, geamikojn, gekolegojn, eĉ najbarojn, ke ankaŭ ili lernu la zamenhofan lingvon!

Mi scias, tiu ĉi ne estas facila afero. Multaj homoj havas ankoraŭ nescion pri Esperanto. Senĉese en la amaskomunikiloj eĥas pri la lernado de grandaj naciaj lingvoj. Apenaŭ estas aŭdeblaj informoj pozitivaj pri Esperanto. Kvazaŭ jam nia amata lingvo ne ekzistus. Kiuj scias pri ĝi ion kaj tiuj malice rimarkas: „Ja, tiu artefarita lingvo, kiun parolis kaj uzis antaŭ multaj jaroj.”

Ni montru al ili, Esperanto ankoraŭ ekzistas!

— Ŝaŝa —

— Redaktanto —



Interesaĵoj

Nun ĉi tie mi tradukas kelkajn interesaĵojn. Esperanto estas kapabla ne nur traduki belliteraturon, sed ankaŭ alian literaturaĵon.

Virino edziniĝis al fantomo

Ni ĉiuj sopiras pri tiu homo, kun kiu ni povos vivi en perfekta harmonio, al kiu ni povas rakonti ĉion kaj kiu subtenas nin. Ekzistas feliĉuloj, kiuj sukcesis trovi tian homon kaj ili vivas feliĉe unu kun la alia. Sed estas homoj, kiuj vane atendas, neniam estas trovata ŝi aŭ li.

La irlanda Amanda Teague, kiu laboras kiel imitanto Jack Sparrow ne trovis la veran viron.

Laŭ ŝi, en la fizika mondo ŝi neniam trovos por ŝi edzon, tial ŝi decidis serĉi edzon inter la fantomoj, kun kiu ŝi geedziĝos.

Amanda edziniĝis al haitia pirato el la 18-a jarcento. Li nomiĝas Jack.

Kompreneble la virino ne vidis sian edzon, ĉar li estas fantomo.

La geedziĝa ceremonio okazis sur internacia maro, por ke ĝi estu valida. Dum la ceremonio medio parolis anstataŭ la fantomo.

„Mia edzo, mia spirita kunulo. Tial mi elektis lin, ĉar tiel li aspektas, kiel Johnny Depp la pirato de la maro Kariba, Kompreneble li tute ne similas al li, ĉar mia Jack havas malhelan haŭton

La geedzan ceremonion partoprenis nur dekdu homoj, la proksimaj geamikoj de Amanda kaj ŝia edzo.

Amanda rakontis, kia estis la unua nokto kun sia edzo.

„Nekredeble seksumi kun fantomo same tiel okazas, kiel vivanta viro. Ja, estis aŭdite de multaj homoj, ke li/ŝi sentis, kiel la fantomo tuŝis la vangon aŭ manon. Do ankaŭ dum ĉi nokto okazis tio. Nur tio estis nekutima, ke mi sentis la pezon de Jack, kiel li kuŝiĝas sur min. Laŭvorte mi sentis liajn ĉiujn movojn. Tio estis eksterordinare bonege!”

Amanda kaj Jack deziras verki komune libron pri sia amo kaj spertoj.

— Fonto: <https://noizz.hu/szines/hozzament-egy-no-egy-szellemhez/zqtw88x?placement=WidgetSeeAlsoExtended&position=5> —

Eksterordinara anonco

Ĉu eble la signoj de la fremduloj? La sciencistoj ekzamenas ĝin.

La unua rapida radiosigno estis kaptita en 2007, ekde tio oni sukcesis registri pli multe da signoj.

Kelkaj opinias, ke la signoj devenas el rapide rotacianta neŭtronostelo, sed ne eblas ekskludi la ĉeeston de la evoluinta civilizacio. Ryan Shannon la kunlaboranto kaj la teamo de Teknika Universitato Swinburne komencis serĉi ĝin en 2017 en Okcidenta Aŭstralio

La fakuloj trovis 20 interesajn signojn dum la analizado, vere unu tian signon jam trovis ankaŭ alia esploroteamo.

Laŭ la rezultoj sendube la radiosignoj alvenas el la kontraŭa flanko de la Universo. Ĝis nun la plej proksima fonto troviĝas minimumo je 425 lumjaroj de Tero.

Dum la esplorperiodo ĉiuj fontoj faris nur unu radiosignon.

Laŭ Shannon la rezultoj konkludas du eblojn. Laŭ unu konkludo indas izoli la unufojan respektive la ripetantan radiosignon.

La alia grava malkovro ili estas pli fortaj kaj ilia difozo estas pli malgrandaj, kiel ĝis nun konitaj. (La radiondoj difuzas dum la disvastiĝado, pro la troveblaj materialoj en la kosmo, ekzemple pro gasonebuloj.

Tiu ĉi signifas, ke la materialo farante difuzon povas esti en la spaco, tial oni povas studadi ankaŭ tiun ĉi materialon

La sekva celo de Shannon lokalizi pli precize la fonton de la radiosignoj.

La lokodifino espereble donos respondon post iom da tempo pri la tipo de la objekto kaj de kie devenas la signoj.

— Fonto:

<https://avilagtikai.com/articles/view/rendkivul-i-bejelentes-titokzatos-jeleket-fogtak-az-urbol>

— Tradukis: Apáti Kovács Béla —



Poezio

Kial mi ŝatas la poemojn de nia grandioza poeto Baghy Gyula (Julio Baghy) ? — Ĉar liaj poemoj, versoj estas facile kompreneblaj ankaŭ por komencantoj.

La poemoj de Baghy estas la perloj de esperanta literaturo. Kiam mi legas lin, liaj vortoj kaj frazoj flugigas min al la ĉielo kaj ili donas al mi eksterordinaran plezuron.

Se vi estas ankoraŭ komencanto, komencu ekkoni Esperanto – poezion per liaj poemoj.

Mi garantias, ĉi poemoj kaj versoj estos neforgeseblaj.

Julio Baghy

Julio Baghy, homo homa
Homecon serĉas malespere
Kaj luktas arde kaj kolere
Kun la milito sango-voma

En nokto de Malam' fantoma
La koron portas li fajrere
Julio Baghy, homo homa
Homecon serĉas malespere

Pri ĉio misa, falsa, gnoma
Indignas li profet-severe
Sed ofte ridas ni sincere
Se ĉarmas nin per ŝerc' aroma

Julio Baghy, homo homa

/ Kálmán Kalocsay, Rimportretoj.



Al kavaliroj de la paco

Kavaliroj de l' Tutmonda Paco,
kun kora soleno salutas mi vin!
Superombro vin transtera graco
en nobla labor' de komenco ĝis fin'!
Vana preĝo de l' senpatraj buŝoj,
vidvina funebro, patrina dolor',
muta veo el sub tombaj pluŝoj
de fratoj murditaj nun ŝvebas al kor'...
Ho, aŭskultu la martiran psalmon!
Tre orfe ĝi ploras en bruo de l' mond'.
Ĝi inspiru vin por planti palmon
de l' paco tutmonda kaj bela estont'!

Kavaliroj de l' Tutmonda Paco,
jam nun fantomadas la nova milit':
antaŭ pacaj sojloj la minaco
jen skuas la pugnoj kun venĝo kaj spit'.
Por kanonoj la patrinoj naskas
kaj oni edukas la filojn por mort',
nun ankoraŭ la malic' sin maskas,
sed baldaŭ la vivon sufokos perfort'.
Monstraj manoj kirlas la vivmaron,
preparas abismojn sub la ondokrest':
fora fulm' avertas la Homaron
pri nova tajfuno, pri sanga tempest'.

Kavaliroj de l' Tutmonda Paco, '
kirasu la koron per firma konkord'!
De l' kabana budo ĝis palaco
per agoj homamaj prediku pri l' ord'!
La cikatrojn de l' militaj vundoj
kuracu per brava kaj nobla sinten',
vian ligan en la koraj fundoj
sigelu konsento kun frata manprem'!
Via celo estu—festpreparo,
ne por la moment', sed por longa jarcent'.
kiam vin benante la Homaro
festenos la Pacon en Nova Sent'.

(Julio Baghy)



Por infanoj

FABELO / la 4 a rakonto /

MIRA RENKONTIĜO

Komenciĝis aŭgusto. La vetero ankoraŭ belas kun pli da sunaj tagoj. Sur ĉielo brodas blankaj nubetoj diversformaj. Angule de via okulrigardo videblas nubeto korforma. Antaŭ viaj okuloj troviĝas densa kolekto de neĝoblankaj nubetoj. Tre similas al ŝaŭmkremo. La videbla ĉielo super nia urbo lazuras. Tagiĝo senventa.

Sunaj radioj rapide etendas siajn varmajn brakojn varmigante la teron. La ekstera temperaturo rapide altiĝas.

En la domkorto de la gepatroj de Petro estis tre viglaj ekde frua mateno. La gepatroj de Petro estis okupitaj purigante la domokelon. Pro tio en la korto estis elĵetitaj malnovaj seĝoj, malnovaj dometo por bestoj, jen, videblas iomete disŝirita kuseno, malnovaj iloj kaj diversaj ujoj kaj multaj aliaj objektoj.

Petro kaj Jana sidis komforte babilantaj kiam la patro de Petro diris:

— Petro, ĉu vi havas amikojn en proksima arbaro? Vidu filo, kial vi ne transdonu ĉi tiujn dometojn al ili? Ja, somero rapide pasas kaj venos pli malvarmaj veteroj. Kion vi diras rilate al tio? - demandis la patro, rigardante ilin scivole.

— Jes, paĉjo, bonega ideo. Ĉu ne Jana? Petro kun nekaŝita ĝojo turnis sin al Jana.

Jana staris silenta momente, poste ekkuris en la brakumon de la patro de Petro.

— Dankon, bela ideo paĉjo. Mi intencis diri ke ni morgaŭ kunportos iom da nutraĵo por birdoj, same por hundoj kaj por katoj. Mi aĉetos ĉion en la Besto Pet-butiko - respondis Jana frapante la manon de la tableto troviĝanta apud ŝi.

— Jes, Jana. Kia bela ideo! Ni refarbigu la malnovajn dometojn. Kiel ni surprizigu niajn amikojn.

La patrino de Petro staris apude rigardante kiom Petro kaj Jana estis feliĉaj. — Mi helpos vin - ŝi diris.

— Ja, mi donos al vi farbojn kaj ni kune refreŝigos la dometojn, eĉ tiun kusenon, ŝi montris al tiu direkto, aldonante - jes, tiun troviĝantan meze de la domkorto

Vi povos forpreni ĝin por viaj amikoj. — Mi rekudros ĝin. Estu ĝi kiel nova - finis ŝi sian paroladon.

Dirite farite.

Post iom da tempo de diligenta laboro rezultoj aperis. Antaŭ ili staris du belaj dometoj. Unu por hundo kaj la alia por birdoj.

La jupo de Jana kaj pantalonoj de Petro estis malpurigitaj de farbo, tamen ili estis feliĉaj.

— Estas bone, ke panjo donis al ni tiujn gantojn, alie niaj manoj estus farbitaj samkiel niaj vestoj — diris ŝerco Petro.

Ili ĉikanis unu la alian sed neniu estis ofendita.

— Morgaŭ posttagmeze je la sesa kaj duono ni forprenos la dometojn al niaj amikoj. Kiom multe ili estos surprizitaj - diris gaje Petro.

Ni revidos nin posttagmeze. Ĉu bone? — diris Petro salutante ŝin.

Mateniĝis suna bela tago. Jana gaje kuretis tien alien. Ŝia vizaĝo ruĝiĝis dum blujaj okuloj ridis feliĉe. Ŝi preparis ĉion, sed rekontrolis ĉion dekfoje zorgema, ke ion ne forgesu.

Posttagmeze je la sesa kaj duono Jana senpacience atendis Petron. Ekvidinte lin ŝi svingante per blanka tuto, ekkriis:

— Petro, ja hastu! Niaj amikoj atendas nin. Ni malfruiĝos - diris ŝi zorgemvoĉe.

Petro fiere ekpaŝis kriante:

- Nu, venu vi ĉi tien, la patro venas por veturigi nin arbaren aŭte. Li vole helpos nin.

Nun, ili ĉiuj estis kontentaj. La patro ĉar li ekvidos kiel lia kara filo pasigas tempon. Petro kaj Jana ĉar ili venos ĝustatempe al siaj amikoj.

Sed ne ĉio estas laŭ nia deziro. Kvazaŭ Diabolo enplektigis siajn manojn.

La aŭto ne moviĝis.

— Kio okazas nun? - demandas sin la patro. La infanoj estis mire silentaj.

— Mi devos alvoki iun por ekzameni aŭton — diris li post kvin minuta paŭzo.

— Ja, certe malŝarĝitaj baterioj ... ja malestas elektriĉo. Eble devas plenigi la akumulatoron - grumbas la patro maltrankvile.

La infanoj staris malgaje apud aŭto. Tiam iu fajfis al ili. Ĉiuj turniĝis al la sona direkto.

La granda rido ekaperos al la lipoj de Petro. Li ekkuris en la brakumon de maljunulo stiranta la provizoran biciklon havanta la grandan korbbon troviĝanta malantaŭe, sed firme ligita por la stiranta biciklo.

Ĉu mi devas priskribi al vi kio okazis poste? Jes, vi bone divenas. La patro metis ĉion flanken el la aŭto, poste facile enmetis ĉion en la korbbon. Apogante kaj puŝante la biciklon kune kun la maljunulo ili sukcese atingis la arbarrandon. Tie jam senpacience atendis ilin la amikaro.

Aŭguste la vetero plibeliĝas. Ŝajnas, ke daŭras someraj varmaj tagoj. Tamen la tagoj iomete mallongiĝas.

— Kiaj belaj dometoj! — unuvoĉe kriis la amikoj.

— Jana kaj mi, volis vin surprizi - diris Petro fiere. Vidu kiom da nutraĵo Jana donis por vi. Ni kune farbis viajn novajn dometojn.

Fabelo

— Niaj dometoj – ekkris la hundo kaj duone blankmakulita kato. Ĉiuj ekridis
 –Kara kato, vi travivos vintron ĉe mia domo, kun mia domkato kaj tiu dometo estas por birdetoj el la tuta arbaro. Por vi kaj por birdetoj kaj por nia saĝa hundo estu la manĝaĵo – diris ride Petro donacante la grenosemojn kaj aliajn manĝaĵojn por la amikoj
 – Ho, nun speciala donaco por la hundo. – Jen hundo kara, ostoj por viaj dentoj – diris Jana malferminte ŝian manplaton montrante la ostojn.
 – Ankoraŭ unu surprizo – diris Petro kun sekreta vizaĝmieno dum ili scivole rigardis, kio estas tio kion Petro kaŝas malantaŭ lia dorso.

Petro venas malrapide alportante du belajn floropotojn direktante al la papilioj.

— Jen, floroj por niaj karaj papilioj. Mi metu ilin apud la dometoj. En ordo amikoj?

—Jes, ĉiuj gaje respondis. Birdoj ekpepis, la kontentaj hundo kaj kato brue fojfoje eniradis en la dometojn dum la papilioj flugadis ĉirkaŭ la floretoj.

Tiam alflugis al ili nealvokita lampiro.

— Ho kia gaja amikaro! Ĉu vi akceptos min en via amikorondo – demandis ilin Lampiro.

— Vi jam estis akceptita diri Jana. Vi havas la propran lumigilon. Tial vi estu nia estonta horloĝo. Kiam vi alflugos al ni ni scios ke estas tempo por disiĝi .

— Ke estas tempo por reveni hejmen, por ke niaj gepatroj ne estu zorgemaj – kapjesante diris Petro.

Ĉiuj ride salutis unu la alian kaj promesis la baldaŭan renkontiĝon.

— Ĝis revido karaj amikoj !– salutis ilin kontente Jana kaj Petro

-ĜIS REVIDO! eĥis arbaren en la varma aŭgusta vespero.

FINO de la kvara rakonto Verkis MIRIĈ
 Jadranka-ZAJEĈAR –SERBIO 2018

